Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**14-a de julio 2020, numero 2**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## TEJO-Komitatkunsido




La Unua reta Komitatkunsido de TEJO okazis la 12-an de julio. Nun ĝin eblas spekti libere en jutubo: *https://www.youtube.com/watch?v=L1cNCkPHtng*

Elektoj de la Estraro, Vicprezidantoj kaj la Prezidanto de TEJO okazos inter la 13-a kaj 17-a de julio.

Dua Sesio de Komitatkunsido okazos la 18-an de julio 2020 (15:00 – 17:00 CEST).

(kaj, se necesas, Tria Sesio – la 19-an de julio 2020 (15:00 – 17:00 CEST)).

## En Kontakto kun Viktoro Solé




*En Kontakto*! estas oficiala programero proponita de TEJO por la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020). Ĝi estas serio de vivelsendaj babiladoj kun la redaktoro de la revuo *Kontakto* kaj kunlaborantoj/aŭtoroj de la revuo.

Por tiu ĉi nuna, la dua, *En Kontakto*, kiu okazis lige kun NASK, Rogener Pavinski invitis la katalunon Viktoro Solé, kiu respondecas pri "la Blaga Blogo", konstanta ero de la revuo *Kontakto* kaj unu el la plej karaj eroj. Gvidis la programeron Luis Obando el Kolombio.

## La 10-an de julio komenciĝis la unua reta Internacia Junulara Kongreso #IJK2020!



Homoj el la tuta mondo parolas pri la graveco de la reta IJK kaj rakontas kion signifas por ili tutmonda solidareco.
https://tinyurl.com/y9cgftrk



# Tago de Meza Oriento kaj Norda Afriko




La 4-an de julio okazis MONAT, Tago de Meza Oriento kaj Norda Afriko (MONA), kiun sekvis en la reto ĉ. 1800 personoj. Ĝi aperas en *UEAviva* ekde 11.07.2020 en kvar partoj. La unua: Malfermo, kun muzika antaŭludo de Fransoazo, enkondukaj paroloj nome de MONA kaj UEA kaj pluraj salutantoj, i.a. la Prezidanto kaj estraranoj de UEA: https://youtu.be/efoX6xI2GCc. La dua parto estis: landaj raportoj kun koncerto de Jomo.

# Tago de Azio kaj Oceanio (TAO)

Tago de Azio kaj Oceanio (TAO) okazis virtuale per Zomo (Zoom) la 26-an de junio interrete kadre de "MondaFest' 2020".




Foto: So Jinsu

Detalajn informojn pri la aranĝo vi povas trovi en la senpage elŝutebla 67 paĝa (!) "Kongresa Libreto": *https://tinyurl.com/y9x8xwyu*

# Kunvenu kun E-USA virtuale

Kadre de **#mondafest2020** kunvenu kun E-USA virtuale de la 12-a de julio ĝis la 18-a! Ĝuu la 75-an datrevenon de Unuiĝintan Nacioj kun esperantistoj!

Se vi volas ĉeesti ion ajn de la bunta horaro vi devas registriĝi.

Registrado estas tute senkosta.

E-USA sendos la ligilojn de Zoom kaj aliajn informojn al vi post kiam vi registriĝos. Vi rajtas elekti, kion vi ĉeestos.

esperanto usa

UEA gratulas al E-USA! Kaj deziras sukceson!

# Esperanto en universitatoj

En la juli-aŭgusta numero de la revuo *Esperanto* aperis la artikolo «Entuziasma Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj» de Ahmad Mamdoohi. La 8-an de junio, komenciĝis la unua sesio de la aranĝo. La 2-a sesio okazis la 22-an de junio. La 3-a sesio okazis jam kadre de la MondaFest' la 6-an de julio.




Partoprenis multaj eminentaj esperantistoj, i.a. Ilona Koutny, Humphrey Tonkin, Renato Corsetti, Orlando Raola, Vincente Manzano-Arrondo, Amri Wandel kaj multaj aliaj.

La registritajn filmojn de ĉiuj sesioj vi povas spekti ĉe:
https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/

## Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

# Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2020 – Oka okazo!

Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej

La Festivalo, jam la okan jaron sinsekve, fariĝas tradicio sub la zorgo de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado kaj kun subteno de la urba registaro de Vroclavo, Pollando. La Festivalon iniciatis Małgosia Komarnicka kaj jaron post jaro tiu aranĝo akiras subtenon de neesperantistaj organizaĵoj.

En la Festivalo partoprenas infanoj, gejunuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj el la tuta mondo, ĉijare en tri kategorioj: 1. Solisto, 2. Koruso aŭ ensemblo, 3. Registrita en studio. Ĉiu partoprenanto kantas unu kanton nur en Esperanto. Pro la kuranta eksterordinara situacio, la Festivalo 2020 unuafoje okazos per interreto. Ĉi-jare ĝi estas speciale dediĉita al Mila van der Horst-Kolińska (1927–2019), kiu de la komenco de la Festivalo subtenis ĝian disvolvon.

La partoprenontoj kontaktu la organizantojn (*festivalo.eo@gmail.com*) por ricevi la instrukciojn kiel sendi poste filmeton kun la kanto.

En la konkurso estas tri aĝkategorioj: 0–18 jaruloj, 19–54 jaruloj kaj 55–111 jaruloj. La livero de la konkursaĵoj en Esperanto estos akceptataj ĝis la 15-a de aŭgusto 2020. La internacia ĵurio pritaksos lingvan kaj muzikan kvaliton.

La premioj estos aljuĝitaj por tri unuaj lokoj. Plie estos aljuĝitaj Publik-premio kaj Ĉefpremio. La rezultoj de la Festivalo kaj dissendo de la premioj al la distingitaj partoprenantoj okazos post la 12-a de septembro.

Honoran patronecon pri la konkurso akceptis Jacek Sutryk – la Prezidanto de Vroclavo, Bohdan Aniszczyk – la Prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo, kaj la organizaĵoj: Universala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Eurokka (muzika faka asocio de UEA, la kreinto de la eldonejo Vinilkosmo) kaj *Juna Amiko* (la plej konata kaj ŝatata revuo de Esperantujo) kaj Varsovia Vento (interreta radio).

https://www.facebook.com/esperantorevuo

**Sekvu la revuon *Esperanto* kaj la Retan Revuon**

https://twitter.com/revuo_esperanto

# Jarkolektoj de la revuo Esperanto liberaj por elŝutado



UEA informas, ke eblas libere elŝuti ĉiujn jarkolektojn kaj numerojn de la revuo *Esperanto* de pli ol antaŭ unu jaro disponeblajn en la retejo de UEA.

La retejo nuntempe provizas la jarkolektojn ekde 2002. Trovu ilin ĉe http://uea.org/revuoj/esperanto. Por elŝuti la liberajn numerojn oni devas musklaki la butonon "Elŝutu la numeron". Ne necesas ensaluti por numeroj de pli ol antaŭ unu jaro.

Bela novaĵo estas ankaŭ tio, ke ĉiuj voĉlegitaj numeroj de antaŭ pli ol unu jaro estas same libere aŭskuteblaj: http://uea.org/revuoj/sono – kune kun la voĉlegita aprila numero de 2020. La voĉlegado estis reprenita de la pasinta Estraro de UEA, sub kunordigo de la tiama estrarano Emilio Cid, kaj pro tio ne ĉiuj numeroj estas voĉlegitaj. Nuntempe kunordigas la voĉlegadon Luis Obando kun teamo de volontuloj. La ĉefa celo de tiu grava laboro estas provizi la enhavon de la revuo al vidhandikapitoj. Se vi volas kontribui per legado, kontaktu luis@esperanto.co. Se eblas al vi donaci por tiu celo, via subteno bonvenas per donaco al la Volontula Fondaĵo: http://uea.org/alighoj/donacoj/volontuloj.




**Nia Asocio sincere esperas, ke la komunumo ĝuos tiujn eblojn!**

Vi povas esti aŭtoro de la *Festivala Kuriero* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio redakcio@revuoesperanto.org

# Omaĝe al Júlia Sigmond

Sara Spanò




La 11-a de julio, estas la naskiĝdatreveno de la ruman-hungara verkistino, redaktorino kaj pupteatra aktorino Júlia Sigmond, forpasinta ĉi-jare, pro la nuntempa pandemio, la 23-an de marto.


Ŝia lasta naskiĝdatreveno, pasintjare, estis la 90-a, kaj "90" estas la titolo de la lasta rakontkolekto kiun ŝi publikigis (*https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9751*): ĝin konsistigas mallongaj rakontoj, leteroj, memoroj, pripensoj, kiuj mozaike skizas multfacetan portreton de la Aŭtorino.

Kiel eta omaĝo en la tago de ŝia naskiĝdatreveno, en la 11-a tago de julio, en la suba ludlisto disponeblas 11 sonregistritaj rakontoj el "90": *https://soundcloud.com/saraspano/sets/julia-sigmond-rakontkolekto-90/s-u8eiSfWfwkv*

Voĉlegis por vi, kaj voĉlegos pliajn dum la venontaj semajnoj, Sara Spanò.

Aŭskultu ilin por interkonatiĝi kun Júlia, kun fragmentoj de ŝia vivo, kun ŝiaj pensoj; aŭskultu ilin por vidi la mondon tra la speciala prismo de ŝia verkado

# Nova Aŭskultejo



Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen kaj Stano Marček decidis donaci al la esperantistaro, en tiu ĉi malfacila tempo, kiam multaj el ni devas esti hejme, novan Aŭskultejon, kie oni povas trovi libere aŭskulteblajn sonlibrojn kaj kantojn:

https://t1p.de/auskultejo1

Vi jam povas aŭskulti *La Neĝan blovadon* de Aleksander Puŝkin, *La Strangan Butikon* de Raymond Schwartz, fabelojn de fratoj Grimm kaj de Andersen kaj multajn aliajn tekstojn kaj kantojn.

# La sonlibro "Vi estas mia heroo"

UEA lanĉis la sonlibron "Vi estas mia heroo" (https://youtu.be/piFWPLjglCg) kiel tre speciala kaj kortuŝa okazaĵo de **#mondafest2020!** Ĝi aperis la 3-an de julio kiel simbola omaĝo al la 49-a Internacia Infana Kongreseto, planita por okazi en Montrealo kaj nuligita pro la pandemio. Ankaŭ ĝi estas la unua en serio de sonlibroj, kiujn UEA preparas en kunlaboro kun Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) por diskonigo de literaturo en Esperanto al blinduloj.

Volontule voĉlegis la rakonton Elsa Torres (el la fama videokurso Pasporto al la tuta mondo). Voĉlegis la prezenton la Estrarano de UEA pri Kongresoj kaj Kulturo, Orlando Raola. Kunordigis kaj muntis la sonlibron Estrarano de TEJO, Luis Obando, kunlabore kun la 1-a Vicprezidanto de UEA, Fernando Maia Jr.




La libro taŭgas por geknaboj aĝaj inter 6 kaj 11 jaroj, kiuj devas ĝui la legadon akompane de gepatroj, prizorgantoj aŭ instruistoj. Ĝi estas originala projekto de la Konsulta Teamo de Inter-Agenteja Komitato pri Mensa Sano kaj Psikologia Subteno-Konsila Grupo en Kriza Situacio (IASC MHPSS RG), ligita al UN. Ĝi disponeblas en pli ol 50 lingvoj en la retejo de IASC. La versio en Esperanto aperis kunlabore kun Unesko kaj la 2-a Vicprezidanto de UEA, Trezoro, tradukita de la volontula tradukteamo de UEA, finreviziita de la rusa esperantisto Andrej Peĉjonkin kaj fineldonita de Ĉina Esperanto-Ligo. La sonlibron produktis UEA.

Se vi volas helpi tiun agadon de UEA, vi povas donaci al Fondaĵo Canuto aŭ la la Blindula Kaso de UEA. Ni uzos vian donacon por membrigi blindajn esperantistojn en la Asocio kaj por produkti pli da materialo: https://uea.org/alighoj/donacoj/canuto kaj https://uea.org/alighoj/donacoj/blind.

La revuo *Esperanto* kaj la Reta Revuo nun havas la propran kanalon en Telegramo

**https://t.me/revuoesperanto**